

TEA-BULTENO

2^a JARO

JUNIO 1999


NUMERO 6



AGENDO



- 1 M Ordigo de asocia arkivo
- 2 M
- 3 Ĵ
- 4 V Tradukvespero
- 5 S
- 6 D **Ekskurso al Santa Croce**
- 7 L
- 8 M Ordigo de asocia arkivo
- 9 M
- 10 Ĵ
- 11 V Tradukvespero
- 12 S
- 13 D
- 14 L
- 15 M Ordigo de asocia arkivo
- 16 M
- 17 Ĵ
- 18 V Malnovpokaj diapozitivoj
- 19 S
- 20 D **Ekskurso al Ljubljana**
- 21 L
- 22 M Ordigo de asocia arkivo
- 23 M
- 24 Ĵ
- 25 V Kartluda vespero: Trisepo
- 26 S
- 27 D
- 28 L
- 29 M Ordigo de asocia arkivo
- 30 M



Vortoj de la redakcio

Grandpaŝe alproksimiĝas somero, la plej bela jar-periodo, signifanta «feriojn, libertempadon, vojaĝadon, du- aŭ tri-semajnan nenifaradon!!!» ĉefe por tiuj kiuj ankoraŭ ne emeritiĝis. Jam nun, ni laborantoj - jes, inter tiuj ankaŭ mi enviciĝas - komencas antaŭgustumi la momenton de ripozperiodo, ekplanas turismajn programojn, kompreneble inkluzivantajn Esperanton. Konsilindas konsulti la kalendaron de renkontiĝoj kaj pristudi tiun vastan gamon da partoprenindaĵoj. Sed intertempe, kial ne anticipi tiun ĝuotan periodon per malstreĉigaj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵoj de Triesto kaj Ljubljano. Antaŭ ol decidi, ĉu partopreni en la unua, aŭ en la dua, aŭ - pli bone - en ambaŭ, ni aŭskultu la voĉon de nia kara samideanino, bedaŭrinde forpasinta pasintjare je aĝo de 102 jaroj, s-ino **Fanny Polidori**. Jen kion ŝi skribis, ĝuste ĉi-teme, la 24^{am} de marto 1959 (ekzakte antaŭ 40 jaroj).

Vojaĝu!

Ne ekzistas ununura formulo por esti feliĉa turisto: sufiĉas ke ĉiu trovu la propran. Fiziologia turisma ago sur la homa korpo estas same sedativa kaj stimula, estas rebonigo de la malordaj funkcioj kiujn ĉiu profesia aktiveco pli-malpli grandmezure kunportas.

Eĉ homo indifera kaj memreganta glitas en emociion altgrade riceveman; sensoj kaj menso estas stimulataj per la novaj kaj variaj reprezentadoj. La movo redonas al la okuloj la veran senton de la formoj, koloroj kaj volumenoj kiujn la ĉiam egala kutima vivo platiĝis.

La oreloj ŝirataj per barbara urba akustiko realkutimiĝas al naturaj harmonioj. La menso, labirinto de lamaj sufokantaj pensoj, refreŝiĝas. La ĝojo de vastaj kaj plenaj perspektivoj redonas la perditan internan ritmon. Por favori tiun naturan adapteblecon estas bone, ke, kiam ni vojaĝas, ni hejmelasu kaj forgesu kutiman vivon, malnovajn rutinojn, por pli bone asimili gustojn, morojn kaj tradiciojn kiujn ni renkontas. Tiamaniere la vojaĝo efektiviĝas psikofizikan gimnastikon kiu estas kondiĉo de evoluado kaj konservado kaj specifa antidoto al venenoj kaj malvirtoj de nia bedaŭrinda civilizo.

Ne ekzistas kontraŭindikoj por turismo kiel higiena kaj profilakta recepto. Neniam oni devas forgesi, ke precipa kialo estas reordigi en ĉiuj niaj organaj funkcioj la naturan ritmon de nia vivo plurmaniere difektita.

Nur individuajn limigojn oni devas respekti, tio estas: loka adaptiĝo, rezistemo al movo, toleremo al rapideco, al klimato ktp. Oni povas preferi turismon teran aŭ navigacian, aeran aŭ montan: do, oni povas konkludi dirante, ke turismo kunligas la avantaĝojn de fizio kaj psikoterapio nature kunigitaj, sed por restarigi veran biologian ek-

vilibron necesas ke okuloj, cerbo kaj muskoloj dividiĝu inter tasko kaj ĝuo. La ĝuo ne disperdiĝos, sed pludaŭros en amo al la vivo kaj en valorplena provizaĵo de energio kaj sano.

Tiu kiu ne povas ofte libertempi faru malgrandajn, malmultekostajn dimanĉ-ekskursojn, kaj tiam nepre forlasu kaj forgesu la ĉiutagajn zorgojn. Senkosta promenadeto for de la urbo sufiĉas kelkfoje por redoni fidon kaj esperon por plue daŭrigi la vivon.



TEA invitas vin ĉiujn, **dimanĉon la 6^{am} de junio**, al ekskurso en la verdo laŭ pado rigardanta al la maro: Aŭrisina - Santa Croce - Aurisina. Se la promenantoj ne jam satiĝis per pura aero kaj belaj vidaĵoj, jen bongusta tagmanĝo el naturaj, lokaj produktoj ĉe la agroturisma bieno de familio *Radovic* (Aurisina 138/a), je kosto de po 30.000 liroj. Nepras antaŭmendo. La rendezu-loko estas la parkejo en la placo de *Sistiana*, je la 9^a horo. Pliajn informojn donas TEA-kasisto: marde kaj vendrede - 040-763128.

Esperanta Turisma Societo Ljubljana invitas TEA-anojn al ekskurso tra Slovenio!



Dimanĉon la 20^{am} de junio, niaj slovenaj geamikoj atendos nin, akurate je la 9^a horo antaŭ sia klubejo (Tavĉarjeva 2). La programo, kiel kutime zorge preparita de prof-ino Dragica Grabnar, antaŭvidas viziton al *TRZIC*, interesa urbeto situanta ĉe la kunfluejo de *Bristica* kaj *Mošenik*, fontoj piede de *Karavanke*.

Por kune atingi la celon, ni rendezuos, kiel kutime, en la parkejo trans la landlimo de Ferneti je la 7.30 h.

Interesatoj anoncu sin ĉe TEA-kasisto por mendo de la tagmanĝo kaj por informoj pri kunveturado.

Tie kaj tie pluketante... Zorge de
Elda Doerfler

Kiam ni ekologiumos favore al nia lingvo?

Ĉu fine ni batalu kontraŭ poluciado de la itala?

Ĉiam pli evidentas la simptomoj de tiu malsano kiu infektadas grandan parton de naciaj lingvoj, nome la konstanta pliangligo de la esprimado. Nuntempe okul- kaj orel-frapas, ekzemple ĉe la nove starigitaj vendejoj, reklam-ŝildoj surhavantaj anglalingvajn terminojn; surstrataj afiŝoj propagandantaj varojn per anglaj sloganvortoj; televide, pli aŭ malpli amatorece, enŝovado de usonanglaj diroj en ĉiujn programojn ĉu seriozajn ĉu malseriozajn, kaj - kio plej ĝenas miaopinie - ekestas foje neebleco entute kompreni la artikolojn de ĉiutag-jurnalo aŭ de aliaj itallingvaj revuoj, pro troa uzado de nekonataj terminoj neitalaj. Ĉu tio estas la puno pagenda por internaciigi? Ja oni pli kaj pli paroladas pri globa vilaĝo, pri ŝanĝigo de "loka" pensmaniero al "tutmondiĝa", pri forigo de naciismoj, sed tio tute ne signifas rezigni pri propraj kulturo, lingvo, moroj, eĉ male signifas integriĝi al ĉiuj aliaj popoloj por reciproke pliriĉiĝi per akiro de novaj klerigaj konoj.

Do, eble la tendenco de tiuj kiuj superŝutas nian lingvon per anglalingvaj vortumoj estas bonintenca, ĉar per tio ili kredas pliiĝi nian scipovon de tiu lingvo, sed bedaŭrinde ne tiel (almenaŭ ne ĉiam!) estas. Plie oni devas priatenti, ĉu vere la teksto kongruas kun tio kion oni celis diri. Ekzemplas la tradukoj de la itala al la angla, kiel pruvas tre interesa, satira-moka, artikolo de *Beppe Severgnini*, aperinta en la aldonaĵo «*IO DONNA*» (*Corriere della Sera*) - 23.01.99, sub la titolo: "**Kiel amuza estas la angla lingvo made in Italy**".

«Nia Lando jam survojas al lingva manipulado. Ĉu vi ne samopinias? Do, provu tie kaj tie legi etiketojn, katalogojn kaj uz-priskribojn.

En la plej legata ĵurnalo de Hong Kong aperis rubriko pridetalanta la plej amuzajn mistradukojn de la anglalingvaj tekstoj fare de ĉinoj. La aŭtoro citis etiketojn, broŝu-retojn, vendejajn ŝildojn kaj uzad-klarigajn libretojn. Fojfoje li publikigis - eble tion ankoraŭ li faras, se oni ne ekzekutis intertempe lin! - ĉefverkojn kiaj *Puking Company* (Vomanta societo?) kaj *portable panties* (portebaj kalsonetoj, kio supozigas la ekziston de alkrōĉitaj kalsonetoj). Estis ankaŭ la dentopasto *DARKIE* kaj la biciklo *GOLDEN COCK*, kiuj, eksportitaj al Usono, vekis iom da ŝoko (la unua termino signifas nigrulo, dum la duan mi ne kuraĝas ekspliki). La pristudentoj de ĉi tiu literatura genro ĉiam admire enviis la ĉinan fantazion. Nun ni povas alrigardi la estontecon plenfide: ankaŭ Italio jam troviĝas sur la bona vojo. Legantino de *Modena* sendis al mi katalogon de iu firmao pri lampoj, kie "spotoj el varmorezista plasto" fariĝas *spotlights in head resistant material* (lumjetiloj rezistaj al kapfrapoj? Mi ne kredas: pliprobablas ke iu konfuziĝis inter *heat*, varmo kaj *head*, kapo). Leganto de *Livorno* havigis al mi fotokopion de papero envolvinta ŝim-fromaĝon (*Gorgonzola*) *Cademartori di Introbio (Lecco)*, sur kiu legeblas: "Krusto ne konstruebla" (*crosta non edibile*). Ĉu necesis atentigi, ke oni ne devas uzi la fromaĝajn krustojn por konstrui domojn? Aŭ ĉu oni pensis pri "manĝebla" (en la angla *edible*)?

Kiel ne citi la broŝuron en kiu la "ridanta urbeto" *Iglesias* iĝas - rikananta urbano (*a laughing citizen*)? Kaj kio pri la ŝuisto *SPIDI SERVIS* en *Frosinone*, la meblad-firmao *MAGIK DESIGN PROPOST* en *Casamicciola* kaj, en Milano, la frizistino *BEST IN PHOON*?

En mia libro «La angla lingvo. Duonseriozaj lecionoj» mi citis la uz-instrukciojn de la napola kafokruĉo *A. PASSEGGIO*: «*To fill of water the superior-body till the little hole*» (plenigu per akvo la supran parton de la korpo ĝis la malgranda truo) kaj la agendon *PLANING*, kiu signifas "rabotado" («planizado» oni skribas *planning*, per du «n»). Antaŭ nelonge, mi ĉi tie menciis la tornistran por lernantoj kies siglo estas S.O.B (laŭ la produktantoj, *Save Our Backs* - savu niajn dorsojn; por ĉiuj aliaj, *Son of a Bitch*, filo de...). Ĉu vi pensas, ke oni estis korektinta? Eĉ ne ensonĝe! Do, denuncu, geamikoj, denuncu. www.corriere.it/severgnini.

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Sidejo: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
Tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored@iol.it
Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

JUNIO 1999

| | | | | | |
|----------|---|----|-----------|--------------------------|----|
| Lundo | | 7 | 14 | 21 | 28 |
| | | | | EL INTI RAYMI | |
| Mardo | 1 | 8 | 15 | 22 | 29 |
| Merkredo | 2 | 9 | 16 | 23 | 30 |
| Ĵaŭdo | 3 | 10 | 17 | 24 | |
| Vendredo | 4 | 11 | 18 | 25 | |
| | | | DUANWUJIE | AL MAWLID AL-NABAWIYY | |
| Sabato | 5 | 12 | 19 | 26 | |
| Dimanĉo | 6 | 13 | 20 | 27 | |

JUNIO 1999

| | | | | | |
|----------|---|----|-----------|--------------------------|----|
| Lundo | | 7 | 14 | 21 | 28 |
| | | | | EL INTI RAYMI | |
| Mardo | 1 | 8 | 15 | 22 | 29 |
| Merkredo | 2 | 9 | 16 | 23 | 30 |
| Ĵaŭdo | 3 | 10 | 17 | 24 | |
| Vendredo | 4 | 11 | 18 | 25 | |
| | | | DUANWUJIE | AL MAWLID AL-NABAWIYY | |
| Sabato | 5 | 12 | 19 | 26 | |
| Dimanĉo | 6 | 13 | 20 | 27 | |

2559 BUDHISTA JARO

18 - DUANWUJIE (Ĉinio).



Tiu ĉi estas la «Festo de la draka barko». Laŭlonge de la riveroj oni organizas boatparadon kun barkoj, kies aspekto similas al tiu fabela besto. Estas kutimo manĝi kremaĵojn el rizo, kuiritajn ene de volvaĵo el palmo-folioj.

2055 HINDUISMA JARO

5759 HEBREA JARO


1999 KRISTANA JARO

1419 ISLAMA JARO

25 - AL MAWLID AL-NABAWIYY. Oni rememoras pri la naskiĝo de profeto Muhammad. Estas festa tago kaj la infanoj partoprenas en la preĝaj ritoj. En Egiptio oni starigas tendojn ornamitajn per lampionoj kaj standardoj, sur kiuj versetoj el Korano. En Maroko la infanoj surmetas novajn vestojn kaj ricevas donace de siaj gepatroj dolĉaĵojn kaj etajn sumojn da mono.


21 - EL INTI RAYMI (Peruo).

Temas pri tre antikva Inkaa festo. Estis la momento, kiam oni dankis kaj petis protektadon al Dio Suno. La antaŭan nokton la tuta popolo restis maldorma atendante la revenon de la Dio. Je ĝia ekleviĝo oni aldirektadis preĝojn kaj oferojn. Neĝoblanka lamo, laŭrite, estis oferita kiel danko por ĉiuj donacoj ricevitaj de la Tero.



2559 BUDHISTA JARO

18 - DUANWUJIE (Ĉinio).



Tiu ĉi estas la «Festo de la draka barko». Laŭlonge de la riveroj oni organizas boatparadon kun barkoj, kies aspekto similas al tiu fabela besto. Estas kutimo manĝi kremaĵojn el rizo, kuiritajn ene de volvaĵo el palmo-folioj.

2055 HINDUISMA JARO

5759 HEBREA JARO

1999 KRISTANA JARO

1419 ISLAMA JARO

25 - AL MAWLID AL-NABAWIYY. Oni rememoras pri la naskiĝo de profeto Muhammad. Estas festa tago kaj la infanoj partoprenas en la preĝaj ritoj. En Egiptio oni starigas tendojn ornamitajn per lampionoj kaj standardoj, sur kiuj versetoj el Korano. En Maroko la infanoj surmetas novajn vestojn kaj ricevas donace de siaj gepatroj dolĉaĵojn kaj etajn sumojn da mono.

21 - EL INTI RAYMI (Peruo).

Temas pri tre antikva Inkaa festo. Estis la momento, kiam oni dankis kaj petis protektadon al Dio Suno. La antaŭan nokton la tuta popolo restis maldorma atendante la revenon de la Dio. Je ĝia ekleviĝo oni aldirektadis preĝojn kaj oferojn. Neĝoblanka lamo, laŭrite, estis oferita kiel danko por ĉiuj donacoj ricevitaj de la Tero.

